

SUDFRANCIA STELO

N-ro 210-211 · 2015 · 2-an kaj 3-an kvaronjarojn

<http://esperanto-languedoc-roussillon.fr>

Ni malĝojas pri la morto de nia afabla amikino Fernande Terral.

De 1964, Fernande partoprenis al la starigo de la „Esperantista Grupo de Béziers“. Ŝi multe agadis por la vivado de la grupo kaj de la esperantista movado.

Dank' al Esperanto ŝi multe vojaĝis tra la mondo kaj amikiĝis kun eksterlandanoj. Memore de siaj vojaĝoj, ŝi faris multajn filmojn, kiujn ŝi prezentis al diversaj grupoj tra Francio.

Dum la staĝoj, la Zamenhofaj Tagoj kaj diversaj festoj, ŝi talente ludis teatraĵojn. Ŝi ankaŭ verkis france kaj esperante multajn poemojn kaj tiam ricevis multajn premiojn.

Ŝi forlasas vakan seĝon sed daŭre vivos en niaj memoroj.



S
F
S

RÉABONNEMENT

Pour recevoir la version papier, pensez à vous (ré)abonner au tarif de 10 €, tarif qui inclut la cotisation à la fédération, à envoyer à
Z. Mraïhi le Watteau, app. 827
3 place Watteau
30900 Nîmes.

Pour recevoir dès parution la version numérique par internet : cotisation à la fédération de 2 €, à envoyer à
martine.ragonnet@orange.fr.

Envoyez vos idées, photos, articles, nouvelles... à
Martine Ragonnet, app't 30
130 rue Adolphe-Alphand
34090 Montpellier
martine.ragonnet@orange.fr

Comité de relecture :

Josée Boccadifuoco,
Marie-Blanche Fondrillon,
Louis Ensuque,
Arnaud Lagrange.

Enhavo

- 2 Compte rendu de la réunion fédérale du dimanche 28 avril 2015 à Montferrier-sur-Lez
- 3 Kalvino kaj Hobso
- 4 Kanada vojaĝo
- 6 Supozeble...
- 7 Vizito de ĉina esperantisto, *Ĝan Fude*
- 9 Kalvino kaj Hobso
- 10 LILLE: UK. En Julio 2015 estis la centa!
- 15 KANTU NI... dank' al la Kompanoj



Compte rendu de la réunion fédérale du dimanche 28 avril 2015 à Montferrier-sur-Lez

17 adhérents présents, et 8 pouvoirs.

Rapport moral

par la présidente Josée Boccadifuoco

La rencontre à Avignon, en 2014, s'est très bien passée.

La présidente pense qu'il serait bien qu'il y ait une nouvelle présidence et annonce sa démission de la fonction.

Elle précise que la trésorière n'a pas pu être là car elle est occupée par ailleurs.

Rapport d'activité

par la secrétaire Laurence Esclapez

1. Le bureau s'est réuni une fois en 2014, nous avons communiqué par mail.

2. Parution de 2 SFS

4. Réalisation du week-end festif à Villeneuve-lès-Avignon sur le thème du jeu. Il a réuni les différents groupes du Languedoc Roussillon, ceux de la région PACA et quelques personnes de Rhône-Alpes : 46 participants.

5. Organisation de la venue de Klera (jeune espérantiste russe). Elle est restée un mois et a passé une semaine dans chaque groupe (Nîmes, Montpellier, Lozère, Béziers).

Rapport financier

par la trésorière Zorha Mraihy

Dépenses		Recettes	
Bureautique	400,17	YMCA	2 815
Assurances	75,28	SFS	245
Frais bancaires	7,5	Adhérents + dons	64
Déplacements	74,70	Virements	1 600
Venue de Klera	313,99	Espéranto France	15,7
YMCA	2 805		
Don Lagrange	750		
Total	4 426,47	Total	4 739,7

Résultat: + 313,23 euros.

L'état financier présenté fait apparaître un léger résultat positif.

C'est le week-end à Villeneuve-lès-Avignon avec la venue de Klera qui a généré le plus de mouvements.

Les comptes avec Espéranto France ne sont pas encore très clairs, il faudra voir avec eux pour gérer par notre compte internet nos remboursements de cotisations. En conclusion, suite à la désision de

l'A.G. 2013 de ne pas augmenter les cotisations, nos rentrées d'argent restent très faibles.

Vote des 3 rapports ensemble

Les 3 rapports sont votés à l'unanimité : 21 présents et 8 représentés.

Élection

Renouvellement du C.A.

Dans les 6 personnes sortantes ne se représentent que Maryse Esclapez et Janine Bony.

Se présentent Gilles Pérez et Myriam Rivoire

Vote pour les 4 nouveaux membres du conseil d'administration : ils sont élus à l'unanimité.

Le C.A. comprend maintenant 15 personnes : Pérez Gilles, Rivoire Myriam, Esclapez Maryse, Jeannine Bony, Perez y Sanz Maria, Bichon Véronique, Passarella Jean- François, Carbonnel Colette, Ragonnet Martine, Boccadifuoco Joséphine, Bernard Monique, Bernard Francis, Eysseric Serge, Bourquin Frédéric, Mraihy Zorah.

Les membres du bureau élus au sein du C.A. sont :

Présidente : Gilles Pérez

Vice-présidente : Jeannine Bony

Secrétaire : Maryse Esclapez

Trésorière : Zohra Mraihy

Changement du siège social

Comme convenue dans les statuts, suite au changement de président, le siège social de l'association sera désormais à l'adresse du nouveau président :

Résidence Douce-ombre, appartement 128-B
226 avenue Du Major-Flandre
34090 Montpellier

Kalvino kaj Hobso



Vintre, tri metrojn da neĝo
Minus tridek, tri kvar gradoj
Saint-Laurent sub glacio...
Sed mi vojaĝis en oktobro.
Pluvis, malvarmis, brilis suno,
tra la lando rulis nia buso
haltinte en grandaj vilaĝoj.
Inter la domoj tri metroj
Ne bariloj, verdaj gazonoj,
nombraj lignaj preĝejoj
Niagara, tri akvofaloj
malsekigis nin sur la boato
Agrabla krosado sur rivero
Inter tiuj «mil insuloj»
Du kvadratmetroj, du arboj
Necesas por la insulo.
En malnovaj fabrikoj,
en pasintaj mulejoj,
en imponaj senjarecoj
ni vivis la pasintan vivon
de la riĉaj aŭ ne homoj.
Ni trairis en grandaj parkoj,
Kie kuris grizaj sciuroj,
Aliaj sovaĝaj bestoj.
Aceroj, betuloj, piceoj
Kun multaj koloraj folioj
Rugaj, flavaj, verdaj nuancoj
Tere rufajâ tapiŝo
aldonis mirinda beleco.

S
F
S



Érable devant le parlement de Québec :
l'écorce est dure à enlever



En Saint-Laurent, de la baleno
mi ekvidis nur dorson kaj voston.
Ĉu Québec, Montréal, Toronto
Ĉu 'Bonaventur' insulo,
Ĉu Montmorency akvofalo,
Ĉu fortikaĵo, museo,
Ĉu Halloween frenezo
Ĉu afablaj Kanadanoj...
Sed lasas vin longa poemo
Do iru en Kanado
Ne en vintro, en aŭtuno



Église de Tadoussac (baie du Saint-Laurent),
la plus ancienne de la région

S
F
S



Le seul original que nous ayons vu!

La folie Halloween! Pour les maisons, reconstitution de 1860

Se mi fariĝus floro
mi estus la konvalo
Kies sonoriletoj, la unuan de majo
disdonas abunde felicon
al ĉiuj en la vasta monda.

Se mi fariĝus arbo,
mi estus la abio, reĝo de la arbaro.
Apud mi, bele lumigita,
la infanoj trovos donacojn
menditajn al Kristnaska patro.

Se mi fariĝus birdo,
mi estus fidela hirundo.
Ĝi flugas al ni ĉiujare
Kiel printempa mesaĝisto,
Kaj pepante rondiras en la blua ĉielo.

Se mi fariĝus frukto,
mi estus la pulpa vinbero,
blanka, nigra aŭ orabruna.
Por la terkulturisto ĝi estas la promeso
de rubenruĝa vino, delikata nektaro.

Se mi havus artan talenton,
danĝ' al mia paletro
mi pentrus strangan pejzaĝon
Kiu kunigus floran, arbon, birdon, frukton.
Poste, mi ĝin subskribos pere de verda stel'.



Vizito de ĉina esperantisto, Ĝan Fude



Zhang Fude [elparolata proksimume Ĝan Fude] faras turneon en Francujo.

La grupo de Bitero gastigis la grupon de Montpeliero por trapasi belan tagon en la urbo Agde kun Fude. Ni kune vizitis kaj ĝuis bonan varman veteron, kaj Fude multe ĝojis pri tio.

Fude ankaŭ vizitis nin en Montferrier (li prelegis pri subpremado, kiun suferis lia kristana familio dum la unuaj jaroj de komunismo kaj pri sia deviga laboro en vilaĝo dum Kultura Revolucio) kaj en Nîmes. Pli pri tio en septembro.

S
F
S





S
F
S



Varmega tempo! Ideale por viziti la urbon Agde, „la nigra perlo“. Ni rendevuas kun la montpelieranoj antaŭ la ponto. Niaj geamikoj ekvenas.

Sed kio okazas sur la proksima insulo „Bela insulo“, en la parko de la Kastelo Laurens, kie ni devos tagmanĝi? Tendoj, ĉevaloj, garboj da pajlo, homoj strange vestitaj... Geneviève klarigas: tiun sabaton okazas mezepoka festo. Jen neatenditaĵo, kiu ĝojigas nian ĉinan amikon.

Tiun tagmezon ni mangos en mezepoka etoso, kaj vizitos la kastejon Laurens plejbonaĵo de Nova arto. Kiel salto tra la tempon!

Antaŭ ni eksturmas de Agde.

Marithe, Line kaj Laurence malkovrigas al ni tiun belan urbon kun nigraj bazaltaj konstruaĵoj, mallarĝaj vojoj, florgarnitaj placoj... Por reveni al la „bela insulo“, ni laŭiras la kajojn, malfacile trovi Marie-Blanche inter la tendumejo. Ŝi gardis al ni tablon. Bedaŭrinde ĝi estas sub la suno. Ne gravas, ni elturniĝas alimaniere. Ni prenas la tablon kaj la bankon de la budo pri la mezepokaj ludoj ne ankoraŭ uzita. Vigle ni manĝas kun apetito kaj per manoj... Tute ne ni estas en 20-a jarcento, do ni manĝas per forketoj kaj tranĉiloj.

Marie-Blanche prezentas virtualan viziton de la „kastelo Laurens“, nun fermita pro nesalubreco.

Refortigitaj ni reiras sub varmega suno ĝis la urba centro por viziti la muzeon. Ve! Hodiaŭ, ĝi ekcepte estas fermata!

Lacegaj kaj varmegaj ni sidiĝas sub la platanoj antaŭ freskaj trinkaĵoj. La langoj krokodilas, la ridoj ŝprucas, la etoso estas agrabla...

La montpelieranoj lasas nin por reiri hejmen. La biteranoj vizitas la „konkon“, bazalta nigra klifo forme de duna rondo.

Fine, ek al la domo de Laurence. Kristof preparis pastaĵojn por ni. Fude ĝojas, ĉar li manĝas tion ĉiutage. Li fotas por montri al sia familio. Ek en la liton. La palpebroj fermiĝas.

Kalvino kaj Hobso





LILLE: UK. En Julio 2015 estis la centa!

M@rtine avec Line et les Geneviève



Ĉiuj esperantistoj konis la plej gravan novaĵon de tiu fino de julio: en la belega urbo de Lille okazis la centa Universala Kongreso. Jes, la vetero ne vere taŭgis, sed ... ni aĉetis pluvombrelojn!

Ekde la komenco ĝis la fino, ĉiam, ĉie: amasego da homoj! Komprenoble: okaze de tiu evento, aliĝis pli ol 2800 partoprenantoj... (honto: pluraj ne povis veni pro rifuzo de vizo).

En la kongresejo, Lille Grand Palais, ĝojo, gajaj ridoj, renkontoj... k.t.p.; kaj tri plenplenaj salonoj por spekti la inaŭguron, la fermon, la vesperajn spektaklojn! (Eble ni bezonintus pli grandegan lokon.)

kiel kutime, prelegoj, kursoj, ekzamenoj, ekskursoj

kiel kutime, la ĝojo rendevui, renkonti geamikojn el Francio, el multaj landoj

kiel kutime, tro solenaj inaŭguro kaj fermo, oficialaj eventoj

Kiel kutime...

Sed ankaŭ, mirindaj novaĵoj tiun jaron, kiuj ĝojigis la etoson: muziko, kantoj, plurfoje tage, en la kongresejo (eĉ se: tro da bruo kaj terura akustiko en la komuna salono) sed ne nur, ni kune kantadis sur strate, ĉefe sur la teatro placo, urbocentre...

Alia novaĵo: la ĉiama volo de la LKK komuniki kun ne (ankoraŭ!) esperantistoj por vaste konatigi nian lingvon: per kursoj, spektakloj, eĉ futbala matĉo...

Kia emocio, dum la nacia vespero, kun la Kompanoj, kiuj donacis nin kortuŝantan spektaklon (preparita de du jaroj): giganto sur scenejo, kanzonoj de J. Brel, G. Brassens, kaj la du kultaj nordaj kantoj: ĉe l' nord, kaj kisu min ankoraŭfoje (*le p'rit quinquin*).

El la langvedokaj grupoj elvenis 18 partoprenantoj, kies pluraj deĵoris en gaja etoso. Ni partoprenis kelkajn prelegojn, ekskursojn (La Piscine en Roubaix, le Louvres Lens, kelkaj Amiens, & pluraj vizitis Bulonjo-ĉe-Marco).

Eĉ se tro solena, tro multekosta, ankoraŭ tute ne sufiĉe malfermata tiu kongreso

Eĉ se, malfeliĉe, ŝtelistoj iom fuŝis la etoson ekde la unua tago, por aziaj kongresanoj, kaj dum la matĉo de futbalo (sed kial ne demandi





al ĉiuj kongresanoj donaci nur 1 aŭ 2 eŭrojn? Ĝi iom helpintus).

Eĉ se pluraj (kaj ni!) ne vere ŝatis la internacian vesperon, kiu tro similis televidan elsendon, kaj ĉefe, ne vere komprenis la volon premii artistojn, tio tute ne taŭgis al nia sento pri esperanto; nur la koruso de So Bishop havis la animon de la esperanta movado.

Ĉefe, eĉ se la lillanaj deligitoj tute ne ĉeestis (tamen la de Bulonjo-ĉe-Mar, feliĉe, bone trovis la pordon de nia kongresejo).

Internacia vespero



La kanzoneto de tiu speciala UK, lumigata de la nekredbla grandega afableco de lillanoj kaj de la kanzonoj de la Kompanoj, Jomo, Kajto, Famo... faciligita de la bona preparado kaj organizo de la LKK-anoj, kaj de la multaj deĵorantoj...

Ĝi restados en nia memoro, kiel plia ŝtoneto al nia energio daŭrigi la disvastigon de Esperanto.

Rendevuo en 2016 en Nitra (Slovakujo)!

S
F
S

(Ne estas sur la foto: Rosa, Véronique Bichon, Monique kaj Francis Bernard, kaj Louis Ensuque.)





Mi travivis tute alian kongreson ol miaj amikinoj. De kiam la centa UK estis decidita, mi deziris partopreni en ĝi. Ŝajnas, ke mi ne plu kapablos koni alian. Do estis tre grava UK por mi. Mi volus esti helpanto pli efika kaj mi sentis min honorita akcepti tiom da gastoj en mia lando ĉar mi ĉeestis nek en Parizo nek en Montpeliero.

Mi restis la tutan tagon en kongresejo, vizitis nenian muzeon, faris nenian ekskurson kaj nur parte ĉeestis dum malfermo, fermo kaj internacia vespero. Aliam mi aŭdis multajn konferencojn pli malpli interesajn; mi aŭskultis plurajn muzikistojn kaj vidis kelkajn dancistojn. Tuttage la granda halo ofertis spektaklojn.

Ni estis en bruega etoson kiu tamen ne ĝenis min por renkontiĝoj. Mi multe interparolis kun fremduloj. Mi povis konstati ke esperantistoj ŝatas vojaĝojn kaj ne timas vivi en fremdlandoj. Mi konatiĝis kun Hispano loĝante en Bruselo, Israelanino naskita en Francio, Parizano vivanta en Vjetnamio. Multaj junuloj parolis al mi Marie de Danio, David de Meksiko inter ili. Mi dronis en sentempa mondo.

Jam plurfoje mi spektis samajn malfermojn, fermojn, internaciajn vesperojn. Ĉiam samaj, ĉiam malsamaj ĉiam atenditaj Mi esperis nenian rendezuon tamen la unuan tagon mi traserŝis la rendezuon tabulon kun sento de manko, poste kiam mi vidis ĝin mi estis sekura: tuto en ordo.

Mi aŭdis multajn prelegantojn, kaj la Oratoran Konkurson kaj la kunvenon de la Akademio. Unu el la prelegantoj estis Carlo Minnaja. Mi vidis mirante maljunan sed tamen viglan viron (samaĝa kiel mi), kiun kompreneble mi ne rekonis ĉar mi aŭdis lin kiam li partoprenis en la Oratora Konkurso en Bolonjo (1954). Pli ol 50 jaroj antaŭ! Denaska esperantisto, juna Carlo gajnis la unuan premion. Mi ne memoras, ĉu la konkurso estis rezervita al junaj esperantistoj sed la nivelo de elokvento estis multe pli alta ol nuntempe.

Mi ĝojis aŭskultante belan prelegkoncerton de Gijom Armide,

„40 jaroj en franckantujo“. Li rakontis historion kaj anekdotojn pri la franclingvaj kantistoj de tiu periodo. Nederlando juĝis, ke tio estis neegala kun sono kelkfoje tro laŭta kaj anekdotoj pli malpli interesaj: „Necesas kelkajn ŝanĝojn por esti tute taŭga“; sed por mi ĝi vekis fortajn memoraĵojn.

Mi multe parolis kaj aŭskultis, tre malmulte renkontis miajn amikinojn, tamen ĉiu tuta tago alportis al mi feliĉon kaj amikecon.





En valizo por la kongreso
 someraj vestoj, vortaro.
 Bela Lille, griza ĉielo,
 Kaŝita suno, blovas vento.
 Malvarmumas, falas pluvo.
 Frosttremoj, sternutoj.
 Ne kongreso sed magazeno
 por aĉeti dolĉajn vestojn,
 komfortajn vintrajn ŝuojn.
 Mi prenas pluvombrelon
 Nun, Novembro dum somero.
 Mi komprenas la ekzilon
 De nordistoj en sudo.
 Promenadoj, muzeoj

Ne tro esperantaj kunvenoj
 Vortaro dormas en ĉambro.
 Poste Bruxelles tri tagoj,
 varmas, varmegas, miraklo.
 Kape aperas kaskedo.
 Mi ŝvitas, mi serĉas ombbron.
 Mi soifas mi trinkas bieron.
 Turistoj kaj multaj lingvoj
 Neniu babilas Esperanton.
 Malbona vetero lasta tago,
 Ĉielo ploras dikajn gutojn,
 pluvombrelo super kaskedo...
 Novembro dum somero

S
F
S



Pour la première fois des moments du congrès ont été retransmis en direct, ces vidéos sont visibles sur Youtube, n'hésitez pas à aller y faire un tour histoire de sentir l'ambiance.



Nacia vespero, kantoj:

<https://www.youtube.com/watch?v=lxrYvJ9Ivxo>

Salutoj el aliaj landoj:

https://www.youtube.com/watch?v=Kbxi-us_9tA

Malfermo:

<https://www.youtube.com/watch?v=frgspNkHnVo>

Dum la malfermo, kune (malfacile) kanti la esperon:

<https://www.youtube.com/watch?v=xBRyRkEbYsk>

Malfermo: X. Dewideheim LKK:

<https://www.youtube.com/watch?v=9OZHbPtaqP4>

Fermo, Lille transdonas la flagon al Nitra:

<https://www.youtube.com/watch?v=fXVwLWkmCT4>



Pourquoi ne pas diffuser cette info aux non-espérantistes (sympa à visionner: aliaj landoj salutas, la Kompanoj) ?


Des moments collectifs : clubs de visionnage en direct (possibilité de poser des questions).





Kiam restas am' nur

Teksto & muziko de Ĵak Brel,
traduko de G. Lagranĵ, Marcelo Redulez & Famo
<http://lakompanoj.free.fr>



kiam restas am' nur
kiel dona mesaĝ'
por la granda vojaĝ'
de la am-aventur'

kiam restas am' nur
kara por mi kaj vi
por ke dum tuta viv'
regu ĝoj' kaj plezur'

kiam restas am' nur
por unika promes'
sen alia riĉec'
krom la fid' pri futur'

kiam restas am' nur
por meblad' per fortun'
kaj kovrado per sun'
de l' tristo en suburb'

kiam restas am' nur
la unika rezon'
la unika kanzon'
kaj unika sekur'

kiam restas am' nur
por ke en frumaten'
la povrul' sen mantel'
vestu sin per velur'

kiam restas am' nur
kiel sola ofer'
al la homa sufer'
far mi, la trubadur'

kiam restas am' nur
proponebla al ĉi
tiuj, kies konsci'
serĉas lumon trans mur'

kiam restas am' nur
kiel voj-signalont'
por destino-alfront'
je ĉiu strat-angul'

kiam restas am' nur
por parol' al kanon'
kaj nur unu kanzon'
por konvink' de tambur'

tiam sen io krom
la fortego de l' am'
estos en nia man'
amik', la tuta mond'

S
F
S



S
F
S

